


CERBE kaj KORE



**KULTURA SUPLEMENTO
AL LA REVUO "PONTO" N-RO 123**

N-RO 23 (91), DECEMBRO 2021

Enhavo

<i>Laŭro de la Akademio</i>	3
<i>Originala poezio</i>	
<i>Mikaelo Bronŝtejn</i> Zamenhof-Tage	5
<i>Konstanten Krysakov</i> Medito	6
Nokta baladeto	6
<i>Tradukita prozo</i>	
<i>Viktor Astafjev. La blankbrusta foino. Tred. Gennadij Ŝlepĉenko</i>	7
<i>Esperanto-kulturo</i>	
<i>Anatolo Sidorov.</i> Insignoj esperantistaj	10
<i>Libroj</i>	
“La vojo” (“Путь”) de <i>Mikaelo Bronŝtejn</i>	13
“Ni vivas malgraŭ ĉio” de <i>Valentin Melnikov</i>	13
<i>Valentin Melnikov.</i> Taglibro de fuŝulo (recenzo pri nova libro de Julian Modest)	14
<i>Por distro kaj amuzo</i>	
Krucvortemigmo, kompilis <i>M. Povorin</i>	16
<i>Humuro</i>	
<i>Mikaelo Bronŝtejn.</i> “Certe, la edzino estas dia dono”	17




MIKAELO BRONŜTEJN: UNUA LAŬREATO DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

En 2021 la Akademio de Esperanto (AdE) decidis okazigi du gravajn aferojn, kiuj devas fariĝi marko en ĝia historio. AdE iniciatis la Laŭron de la Akademio kaj organizis la Konferencon de la Akademio, cetere cirkaŭ la Zamenhof-Tago, festata ankaŭ kiel la Tago de la Esperanto-Libro.

La **Laŭro de la Akademio** estas premio al libro en Esperanto arte signifa, lingve perfekta kaj evidente kontribuanta al evoluigo de la esperantlingva kulturo. La premiota libro devas esti eldonita maksimume kvin jarojn antaŭ la limdato por konsiderado de la premio, kiu en tiu ĉi unua jaro konsistas el diplomo kaj premio de 100 € al la aŭtoro. UEA aŭspicias la laŭron; kaj UEA kaj SAT subvencias la premion. La plena regularo de la premio aperis frue en 2021 en

la januara numero de *Esperanto*. Aldone UEA subtenas la aferon per diskonigo de la premiita verkaĵo, kiu en 2021 estas *Mi stelojn jungis al revado*, de Mikaelo Bronŝtejn, eldonita de Impeto. La bardo, kiel estas konata la aŭtoro, estas nun ankaŭ invitata de UEA kiel speciala gasto de la 107-a Universala Kongreso, okazonta en Montrealo (interesatoj povas aliĝi plej favorepreze ĝis la 31-a de

decembro: uea.org/kongresoj/alighilo).



La libro *Mi stelojn jungis al revado* akireblas interalie ĉe la Libroservo de UEA kontraŭ 39 € (sesona rabato ekde 3 ekzempleroj): katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9265. En pli ol 570 paĝoj la aŭtoro pentras en perfekta stilo la intermilitan periodon kaj prezentas la sorton de sovetiaj esperantistoj dum la stalinaj reprezalioj. La anoncon de la premio, por kiu konkursis por la periodo 2016-2021 entute 15 verkoj de 10 verkistoj el 10 landoj, faris la akademiano Carlo Minnaja, dum la Konferenco de la Akademio. La premiito estis unuanime elektita de sepkapa komisiono.

La Konferenco

de la Akademio estas nova evento planita de AdE por alproksimiĝi la Akademion al la publiko. Ĝi okazis dum du tagoj, la 14-an kaj 15-an de decembro, kun sukcesa programo. Kiel parto de la subteno de UEA, la evento estis diskonigita interalie en la diskutlisto de UEA, UEA-membroj, en la internacia kalendara servo de UEA, Eventaservo.org (eventaservo.org/e/43ccc1), en la reta revuo *Esperanto* (revuoesperanto.org/AdE) kaj sociaj retoj, ĉe kiuj eblis konatiĝi kun la programo.

Dum la laboroj subtene al tiel gravaj atingoj la Prezidanto de UEA, Duncan Charters, mem akademiano, menciis la koincidojn ligantajn UEA kaj AdE. Krom li, ankaŭ du nuntempaj estraranoj de UEA estas akademianoj (Amri Wandel kaj Orlando Raola) kaj kvar vivantaj akademianoj estas eks-prezidantoj de la Asocio. Samtempe Charters memorigis, ke, kvankam dum pli ol centjara historio okazis tiaj neeviteblaj koincidoj inter la evoluo de la Esperanto-movado kaj ekzempla spertiĝo pri la lingvo de ĝiaj gvidantoj, UEA kaj AdE ĉiam restis sendependaj.

La jaro 1905 estis tiu de la unua Universala Kongreso de Esperanto, kiam D-ro Zamenhof mem tie proponis la kreon de Lingva Komitato, koncepto evoluinta ĝis 1948, kiam venis decido pri unusola institucio, nome la nuna Akademio de Esperanto. La apartiĝo de la celoj de UEA kaj de AdE gravas, ĉar UEA funkcias dekomence sen enmiksiĝo en lingvaj diskutoj, kun la esenca celo krei solidarecon inter diverslingvanoj per la uzo de Esperanto tiel, kiel difinas ĝia jam elprovita strukturo kaj vortaro, ĉu literatura ĉu teknika. AdE zorgas interalie pri la evoluo de la lingvo, interalie kiel objekto de sciencaj studoj, kaj faras rekomendojn por pliefiki ĝian uzon kiel klaran kaj stabilan instrumenton de interhoma kompreniĝo.

La koincidoj, en la vortoj de la Prezidanto de UEA, trovas lokon en la komuna deziro defendi la lingvon por ke ĝi uziĝu kiel plenrajta interkomunikilo por nia evoluanta mondo. Surbaze de tiu kompreno UEA fieras subteni la Akademion, interalie per gastigo de ĝiaj forumoj dum la Universalaj Kongresoj, sen vundi la memstarecon kaj sendependecon de AdE. Kun plena konscio ke UEA, AdE kaj simile SAT iras siajn apartajn vojojn por tamen kune pliriĉigi nian komunan lingvosperton, UEA gratulas pro la sukcesa laboro farita en 2021 kulminanta en la konferenco, kiu ebligis al la Esperanto-komunumo kune festi la Zamenhof-tagon, kaj same gratulas al la laŭreato, ĝojante, ke la Akademio decidis aljuĝi tiun premion.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 1002, 2021-12-15

Originala poezio

Mikaelo Bronŝtejn

Zamenhof-tage

I

Indulgu min, samideanoj karaj, ho ve! –
Mi ne kuraĝas foje pensi Zamenhofe,
Nek fantazii eĉ, ke ulo tro kruela
Tuj kolombiĝos pace pro l' ideo hela.
Ne revu ni pri tiuj, kiuj ŝtatojn regas –
Jes, ili ŝatas se ni obeeme gregas,
Sed ĉiu grego nepre sentu sin unika
Kaj ĉirkaŭita de gregaro malamika.
Ne revu pri bankistoj, ĉefoj de polico,
Pri generaloj, – vere estas longa vico
De tiuj, kiuj efektive min mirigus,
Se sin kun tiu ĉi ideo ili ligus ...
Kaj skrapas nukon mi, adepto de l' ideo, –
Ĉu ni sidiĝu do kaj ploru nun kun veo?
Oponas la racio: Por atingi multon
Elektu tamen ni plu fosi nian sulkon.

15.12.2021

Medito

Konstanten Krysakov

Ĉu eblas scii pri l'iamo,
se ĝi jam longe estas for?
Absinto, vento kaj cinamo –
jen gustas amo kaj langvor'.

Ĉu eblas penso pri l' ieo,
se restas ĝi malantaŭ dors'?
Abismo, fendo kaj pereco –
rezult' negoca ĉe la bors'.

Ĉu eblas verki pri l' iomo,
se restas vaka vanta spac'?
Abdiko, perdo de la nomo,
humida fino sen minac'.


Nokta baladeto

"Do tempas pesi..."
Valentin Melnikov

Vekiĝis li en ŝvit'. Do tempas pisi.
Enormas la dezir' pro l' troa trink'.
Fortegas la aspir', ne eblas misi,
li saltas kvazaŭ pugvundita link'.
Li sentas faciliĝon gaje fluan,
en lito pretas cedi al malvek'.
Sed sentas tuj li urĝan kontinuan
deziron fari ion por la fek'.



Tradukita prozo



Viktor Petrovič Astafjev **(1924 – 2001)**

estis rusa verkisto, eseisto, dramaturgo, scenaristo. Li naskiĝis en vilaĝo Ovsjanka de Krasnojarska regiono (Rusio). Kiam li iĝis sepjara, lia patro dum stalinaj reprezalioj tute maljuste trafis en prizonon pro "sabotado". La patrino de Viktor Astafjev, vizitante sian edzon, pro akcidento dronis en la rivero Jenisejo. Kiam la patro troviĝis en malliberejo, pri Viktor Astafjev zorgis la geavoj. Por li tiu periodo estis la plej feliĉa. Nome tiujn jarojn li priskribis en sia verko "Lasta riverenco". Kiam la patro revenis el la prizono, li denove edziĝis, kaj deprenis Viktor-on de la geavoj. Sed baldaŭ la patro serioze ekmalsanis. Lia nova edzino tre negative rilatis al Viktor, kaj tute ne zorgis pri li. Rezulte la estonta verkisto trafis en orfejon. En la orfejo li konatiĝis kun Ignatij Rojdestvenskij (fama rusa poeto), instruisto pri literaturo, kiu rimarkis literaturan talenton de la knabo, kaj helpis al li publikigi en lerneja ĵurnalo rakonton "Viva". Poste la aŭtoro donis al ĝi novan nomon "Lago de Vasjutka".

En 1942 li libervole decidis iri al fronto. Oni tuj direktis lin en la urbon Novosibirsko, kie li lernis en aŭtomobila kurso. Jam en 1943 li trafis en militantan armeon. Dum la militservo pro kuraĝeco oni dekoraciis lin per ordeno de la Ruĝa stelo, kaj tri medaloj.

En 1951 Viktor iĝis ano de literatura rondeto. La agado tre inspiris lin, kaj li dum unu nokto verkis rakonton "Civitano", kiu poste ricevis novan nomon "Siberiano". Nomo de Astafjev iĝis tre populara, kaj oni invitis lin labori en la ĵurnalo "Ĉusovska laboristo". Dum laborado en la eldonejo estis publikigitaj pli ol dudek liaj rakontoj kaj tre multaj eseoj.

La unua libro de Viktor Astafjev estis eldonita en 1953. Ĝi enhavis liajn multajn rakontojn sub komuna nomo "Ĝis estonta printempo". En 1955 oni eldonis lian libron "Fajretoj", kiu konsistis el rakontoj por infanoj. Astafjev daŭrigis verki por junaj legantoj. En 1956 estis eldonita rakonto "Lago de Vasjutka", kaj post unu jaro – libro "Onklo Kuzja, vulpo, kato", kaj en 1958 aperis lia libro "Varma pluvo".

En 1958 Astafjev iĝis aŭtoro de sia unua romano "Neĝoj degelas". En la sama jaro aniĝis en la Unio de verkistoj de USSR. En 1976 Viktor ricevis Ŝtatan premion de USSR pro sia fama novelo "Caro-fiŝo". En 1991 la verkisto komencis verki libron "Malbenitaj kaj mortigitaj". Nur en 1994 legantoj povis tralegi ĝin. En la sama jaro Astafjev ricevis Ŝtatan premion de la Rusia Federacio.

En aprilo de 2001 okazis apopleksio al Viktor Astafjev, kaj en novembro de la sama jaro li mortis.

La foino

Vilaĝo Vereino situas sur monto. Piede de la monto troviĝas du lagoj. Sur bordoj de la lagoj kuŝas, iam granda vilaĝeto Zujati, kiu enhavas tri domojn.

Inter Zujati kaj Vereino okupas lokon granda kruta montodeklivo, vidata je kelkdekaj verstoj, kiu aspektas kiel malluma ĝiba insulo. La montodeklivo estas kovrita de plektokreskaĵoj tiom dense, ke homoj preskaŭ neniam vizitas la lokon. Kiel viziti ĝin, se vi deflankiĝos je kelkaj paŝoj de trifolia kampo, kiu kuŝas sur la monto, vi tuj falruliĝos malsupren, kaj trafos sur kruce kunmetitajn branĉojn, kiuj estas kovritaj de musko, sambuko kaj frambejo.

Mallaŭtas, humidas kaj krepuskas sur la montodeklivo. Abiaj kaj piceaj branĉoj efike kaŝas for de la malbona okulo kaj avidaj manoj siajn loĝantojn – birdojn, melojn, sciurojn, ermenojn. Vivas ĉi-tie ankaŭ bonazio kaj tre ruza kaj singarda urogalo.

Foje enloĝiĝis en la densejo de la montodeklivo, verŝajne plej kaŝema besteto – la foino, blankbrusta marteso. Du aŭ tri somerojn ŝi vivis soleca, fojfoje aperis ĉe arbarrando. La foino kaptis per siaj delikataj aloj de la nazo fiajn odorojn de la vilaĝo, kaj se proksimiĝis la homo, tuj kugle trafis en arbaran densejon.

Post du aŭ tri someroj la foino naskis idojn, etajn kiel fabaj silikvojn. Ŝi varmigis tiujn per sia korpo, per lekado briligis ilin. Kiam do la idoj iomete elkreskis, ŝi komencis ĉasakiri manĝaĵon por tiuj. La foino tre bone konis la montodeklivon. Krome ŝi estis zorgema patrino, kaj la idoj ĉiam havis sufiĉe da manĝaĵo.

Sed foje la foinon ekvidis knaboj el la vilaĝo Vereino, persekutis ŝin malsupren laŭ la montodeklivo, kaj kaŝis sin. La foino daŭre zigzagis tra arbaro, kurante de unu arbo al la alia, kaj poste decidis, ke la homoj jam foriris – ili do ofte preteriris la montodeklivon, – kaj revenis al sia nesto.

Tamen kelkaj homaj okuloj gvatis ŝin. La foino ne rimarkis la rigardojn, ĉar treme alpremiĝis al la idoj, kaj atentis al nenio. Ŝi eklekis ĉiun idon kontraŭ muzeleto: mi tuj revenos, – kaj rapide eliĝis el la nesto.

Post ĉiu tago akiri ĉasaĵon estis pli kaj pli malfacile. Apud la nesto ĝi jam mankis, kaj la foino kuris de abio al abio, de piceo al piceo, al la lagoj, al marĉo, poste al granda marĉo post la lago. Tie ŝi kaptis nesingardan garolon, kaj tuj ekkuris al sia nesto, portante en la muzelo la rufan birdon kun la sternanta blua flugilo.

La nesto estis malplena. La foino ellasis el la dentoj la ĉasaĵon, tuj supreniĝis laŭ trunko de abio, malsupreniĝis, denove supreniĝis al la nesto, kiu estis ruze kaŝita inter abiaj branĉoj.

La idoj forestis. Se la foino kapablus krii, ŝi nepre ekkrius.

Malaperis la foinidoj, perdiĝis.

Ŝi atente esploris apudan lokon, kaj rimarkis, ke ĉirkaŭ la abio piedpremis la homoj, kaj unu homo mallerte supreniĝis laŭ trunko, difektante abian ŝelon, rompante branĉojn, restigante post si odoron de ŝvito kaj malpuraĵon en faldoj de la ŝelo.

Vespere la foino jam sciis, ke oni forportis la idojn en la vilaĝon.

Ĝis tagiĝo ŝi intence serĉis la idojn apud domo: saltis de sur tegmento sur barilon, de la barilo sur la tegmenton. Dum kelkaj horoj ŝi sidis sur paduso apud fenestro, kaj aŭskultis ĉu ŝiaj idoj ekpepos. Sed en la korto hundo tondris per ĉeno, kaj raŭke bojis. La mastro kelkfoje eliris en la korton, kaj severe kriis al la hundo. La foino timeme peniĝis sur la paduso.

Nun ŝi ĉiunokte ŝtele aliris al la domo, kaŝe observis, kaj ĉiam per ĉeno tondris kaj furiozis la hundo en la korto.

Foje ŝi kaŝe penetris en fojnejon, kaj restis tie ĝis mateniĝo, sed tage ne havis kuraĝon reveni en la arbaron. Nome tage ŝi ekvidis siajn foinidojn. Knabo elportis tiujn en malnova ĉapo sur peronon, kaj komencis ludi kun la idoj, turnante iliajn ventrojn supren, kaj fingre frapetis kontraŭ ilia nazo. Alvenis aliaj knaboj, kaj komencis nutri la idojn per kruda viando. Poste alvenis la mastro, kaj montrante en la direkto al la foinidoj, diris:

– Kial vi turmentas la bestetojn? Forportu tiujn al la nesto, alie ili mortos.

Poste okazis terura tago, kiam la foino denove kaŝis sin en la fojnejo, kaj denove atendis la knabojn. Ili aperis sur la perono, kaj interdisputis pri io. Unu el ili elportis la malnovan ĉapon, kaj rigardis enen:

– He, unu el ili mortis...

La knabo prenis la mortintan idon je la piedo, kaj ĵetis tiun al la hundo. La pendorela korta hundo, kiu dum la tuta vivo estis ĉenita, kiu kutime manĝis ĉion, kion oni donas, priflaris la idon, turnis ĝin per la piedo, kaj ekis malrapide manĝi tiun, komencante de la kapeto.

En la sama nokto en la vilaĝo estis strangolitaj multaj kokinoj kaj kokidoj, kaj sur alta barilo sufokiĝis la maljuna hundo, kiu formanĝis la foinidon. La foino kuris sur la barilo, kaj tiom kvereligis la stulteman hundon, ke tiu postsekvis ŝin, transsaltante la barilon, kroĉiĝis al ĝi, kaj ekpendis.

Sur stratoj kaj en legomĝardenoj oni trovis sufokitajn idojn de anaso kaj ansero. En domoj, kiuj troviĝis proksime al arbaro, birdaro tute malaperis.

Dum longa tempo la homoj ne povis konjekti, kiu do nokte rabas en ilia vilaĝo. Sed la foino iĝis pli furioza, kaj komencis aperi apud domoj de vilaĝanoj eĉ tage, kaj mortigis ĉiujn bestojn, kiujn ŝi kapablis mortigi. Virinoj aĥis kaj krucoŝignis sin, viroj insultis:

– Tiu do estas satano! Oni alvokis malfeliĉon!

Oni embuskis la foinon, kiam ŝi troviĝis sur poplo apud malnova preĝejo, kaj pafis plumberojn al ŝi. Sed la foino ne mortis, ĉar nur du plumbaj grajnoj trafis sub la haŭton. Post tio ŝi dum kelkaj tagoj kuŝis en la nesto, kaj lekis sian vundon.

Kiam la foino resaniĝis, ŝi denove aliris al tiu domo, kien kvazaŭ nevidebla kondukilo tiris ŝin.

La foino ankoraŭ ne sciis, ke oni vipis la knabon, kiu kunprenis la foinidojn, kaj ordonis forporti ilin reen al la nesto. Sed senzorgema knabo pro sia pigreco rifuzis penetri en la densejon, kaj lasis la foinidojn en ravineto apud la arbaro, kaj foriris. En tiu loko vulpo trovis la idojn, kaj formanĝis tiujn.

La foino iĝis orfo. Ŝi komencis aktive sufoki kolombojn, anasojn ne nur sur la monto, en Vereino, sed ankaŭ en Zujati.

Ŝi estis kaptita en kelo. Malferminte kovrilon de la kelo, mastrino de la lasta domo en Zujati ekvidis la foinon.

– Jen kie vi troviĝas, satano! – la mastrino kunfrapis la manojn, kaj ĵetis sin por kapti la foinon.

Ĉiuj bokaloj, argilaj laktokruĉoj, taso estis renversitaj kaj frakasitaj, antaŭ ol la foino estis kaptita.

La foinon oni enfermis en kesto. Ŝi furioze ronĝis lignon en spliton.

Alvenis la mastro. Li estis ĉasisto, kaj kiam edzino informis lin, ke ŝi kaptis la foinon, li diris:

– Estas vane. Ŝi ne kulpas. Oni ofendis ŝin, – kaj liberigis la foinon, esperante, ke ŝi ne aperos plu en Zujati.

Sed la foino ekis rabi pli aktive ol antaŭe. Pro tio la ĉasisto devis mortigi ŝin ankoraŭ ĝis ĉassezono.

Foje en legomĝardeno apud varmejo li ekvidis ŝin, pelis sur solecan arbuston, kaj ekpafis. La foino falinte en urtikon, ekvidis bojantan kaj kurantan al ŝi hundon kun la malseka faŭko. Ŝi simile al serpento leviĝis el la urtiko, perbuŝe kroĉiĝis al gorĝo de la hundo, kaj tuj mortis.

La hundo ruliĝis sur la urtiko, kaj tre forte hurlis. La ĉasisto per tranĉilo penis malfermi faŭkon de la foino, kaj rompĉis ŝiajn du tre akrajn dentegojn.

Ĝis nun oni memoras en Vereino kaj Zujati la blankbrustan foinon. Ĝis nun oni sugestas geknabojn, ke ili ne tuŝu idojn de bestetoj kaj birdoj.

Nun senzorge vivas kaj reproduktiĝas inter la du vilaĝoj, proksime al la domoj, sur la kruta arboriĉa montodeklivo multaj sciuroj, vulpoj, diversaj birdoj kaj bestetoj.

Elrusigis Gennadij Ŝlepĉenko, Vladivostoko

Esperanto-kulturo

Insignoj esperantistaj

La unuaj esperantistoj meditis pri ideo kiel trovi siajn samideanojn en diversaj urboj kaj landoj. Ankaŭ ili mem serĉis metodojn por la samideanoj povus identigi ilin kiel esperantistoj. Antaŭ iliaj okuloj estis vivaj ekzemploj ĉe kristanoj aŭ volapukistoj. Esperantistoj amase kaj volonte produktis objektojn kun esperant(ist)aj verda koloro, steloj kaj skriboj. Aperis poŝtkartoj kaj poŝtmarkoj, leterpaperoj kaj kovertoj, kravatpingloj kaj broĉoj, kruĉoj kaj kuleroj, ĉampanoj kaj likvoroj, cigaroj, ĉapeloj, krajonoj kaj skribiloj, bombonoj kaj ĉokoladoj.

Certe esperantistoj faris la esperantistajn insignojn. La unuaj insignoj estis produktitaj el kartono. Poste oni produktis el kupro, bronzo, origita bronzo, arĝento kaj oro.

En Ruslando la plej kapabla vendisto de E-insignoj estis Grigorij Vasiljeviĉ **Rjabinin**, ĉar li laboris en Ŝtata Banko en Ĥarkov. Li proponis insignojn ekde 1893-a jaro.

En la numero de “Esperantisto” (15.01.1894/1(49), p.7) ni legas: “S-ro A.Martakov skribas al ni: “Mi petas vin sciigi per nia gazeto “Esperantisto” la amikojn de nia afero, ke s-ro K.Faberje en Moskvo (kortega juvelisto, Kuznecki Most, domo de San Galli) preparis por esperantistoj la sekvantan signon: ringo por malgranda fingro, el oro; kun kvinpinta stelo el senbrila oro; ĉirkaŭ la stelo estas la surskribo: “Lingvo internacia Esperanto, 1887 jaro” per oraj literoj sur verda emajla kampo. La mezo de la tuta longo de la ringo estas verda, emajla. La laboro

estas ne fabrika, sed artista. La kosto de la ringo, se oni aĉetos 2-3 pecojn, estas 13 r. 50 kop., kaj se oni aĉetos pli ol 15 pecojn – tiam 12 rubloj. Tiu ĉi ringo estas vendata nur al esperantistoj, tial, oni devas skribi en lingvo Esperanto...”

En 1910 kiam L.Zamenhof venis al Peterburgo por saluti la Unuan Tutrusian E-Kongreson la peterburgaj esperantistoj donacis al li oran insignon.

Pri la kvanto de E-insignoj ni povas juĝi laŭ informo aperinta en “La Ondo de Esperanto” (1910/3, p.7): “...Konata Drezdena firmao *Glaser & Sohn*, komencinta antaŭ kelkaj jaroj produkti esperantistajn insignojn, informas en sia raporto, ke ĝi dum 4 jaroj vendis entute 60 000 da tiaj insignoj. Se konsideri, ke tiajn firmaojn, produktantajn insignojn, sur la terglobo estas kelke, rezulte estas brila atesto de disvastigo de Esperanto dum la pasintaj jaroj...”

En Sovetio estis nur unu sola persono kiu profesie produktis E-insignojn. Temas pri Rimantas-Stanislovas **Endriulaitis** (03.07.1938, vil. Šimkaičiai, distr. Jurbarkas, – 2020). Litovo. Naskiĝis en metiista familio. La patro estis meblisto kaj la patrino – kudristino.

Endriulaitis en 1960 finis la Terkulturatan teknikumon de Smalininkai, fine de 1960-a jaro ekloĝis en Vilnius kaj eklaboris kiel supera inĝeniero en la akcia kompanio *Sigma*. Esperantistiĝis en 1966. En 1967 li finis E-kurson kaj iĝis membro de E-klubo, vizitadis E-aranĝojn.

Havante favorajn kondiĉojn en la uzino, li komencis la unua en Sovetio produkti E-insignojn. Per la insignoj Endriulaitis propagandis Esperanton, disvastigis ilin dum E-aranĝoj. Dank’al la helpo de Povilas Jegorovas, Vytautas Šilas k.a. insignoj de Endriulaitis atingis eksterlandon: ili nun estas troveblaj en la muzeoj de Vieno, UEA, Roterdamo, diversaj E-klubo. De 1967 li partoprenis preskaŭ en ĉiuj BET-oj, en 1992 – SAT-kongreson.

Post restarigo de Litovia sendependeco ekestis ebleco libere veturi eksterlanden. Endriulaitis partoprenis kaj disvastigis siajn E-insignojn en 76, 77, 78, 80, 81, 83 kaj 84-a UK-oj de Esperanto. La elspezojn de la vojaĝoj al kongresoj li kovris vendinte E-insignojn. Al la UK en Bergen li veturis kun grupo per ŝipo, al Vieno – memstare, al Valencia, Tampere, Prah, Montpelliero kaj Berlino – organizite kun grupoj el Litovio.


Dum 41 jaroj (1977-2008) Endriulaitis produktis ĉ. 35 000 insignojn de 350 specoj kaj krom tio ĉ. 15 000 insignojn de ĉ. 150 specoj, destinitajn por jubileoj de diversgradaj lernejoj, institucioj, uzinoj, *Sajudis*, sendependeco de Litovio k.a. Li plenumis mendojn por produkti insignojn el tuta Sovetio. De 1999 li plu ne laboris en la uzino, estis pensiulo kaj ne povis tiamamplekse okupiĝi pri produktado de insignoj. Li mortis en 2020 jaro.

Pri li:

Eksjunecano. *Majstro de insignoj // Litova Stelo*, julio-augusto 2008/4 (182), p.16-17.

La insignoj estas produktataj por internaciaj kaj naciaj Esperanto-Asocioj: UEA aŭ SEU; por profesiaj aŭ partiaj unioj: IFEF kaj Socialistoj; por regiona, urba, kluba skalaj; dediĉitaj al E-Kongresoj, tendaroj, datoj, konferencoj aŭ personoj; aluminiuj, dumetalaj aŭ plastaj; rondaj, kvadrataj, kvinstelaj, konusaj, rombaj; kun Esperanta aŭ kun nacia flagoj.





Libroj

Esperantaj poetoj en la rusa!

La 12-an de decembro mi kun Impeto (Anna) prezentis la dulingvan antologieton de Esperanto-poezio "La Vojo". La 200-paĝa libreto estas lukse eldonita kaj enhavas verkojn de 45 Esperanto-poetoj en Esperanto kaj en la rusa.

Mikaelo Bronŝtejn


Tio estas la unua en la historio antologio de la originala Esperanto-poezio, tradukita al la rusa lingvo.

Poezia kolekto de Valentin Melnikov

Valentin Melnikov estas konata en Esperantio kiel tradukisto de poezio: lia traduko de "Eŭgeno Onegin" far Puŝkin (2005) estas la plej ampleksa kaj senmanka el ĉiuj aliaj. Krome, li sufiĉe multe verkis originale, kaj liaj verkoj aperadis en diversaj revuoj, en kolekto "Moskvaro" (1998) kaj antologioj "Lena..." (1998), "Moskvaj sonoriloj" (2007), "Abritus" (2016), "Belarta rikolto 2016", "Poezio el ĉiuj ĉieloj" (2017 kaj 2019). Tamen ĝis nun iu persona kolekto de liaj originalaĵoj ne aperis, malgraŭ tio, ke pluraj el ili ricevadis premiojn en diversaj poeziaj konkursoj, do, estas agnoskitaj kiel altkvalitaj.

Do, "Ni vivas malgraŭ ĉio" (Moskvo, "Impeto", 2021, 72 p.) finfine forigis tiun "maljustaĵon", kaj ĉiu deziranto havas eblecon konatiĝi kun diverstempaj poemoj de V. Melnikov – ekde fino de 1990-aj ĝis nun (ankaŭ kun kelkaj tradukoj kaj unu prozaĵo). Restas nur bedaŭri, ke kelkaj bonaj pecoj de la aŭtoro ial estas ekster la kolekto (ekz., "unuversoj").

Do, legu kaj ĝuu!



Necesas nur aldoni, ke la librojn de M. Bronŝtejn kaj V. Melnikov libere mendeblas ĉe la retejo de la eldonejo "Impeto" <http://lernolibro.ru/novinki>

Taglibro de fuŝulo

Recenzo pri la nova libro de Julian Modest

Nova libro de Julian Modest montras novan flankon de lia verkista kapablo (mi ne uzas la vorton “talento” – baldaŭ vi komprenos kial). Ĉi-foje estas historia romano, temas pri kontraŭsocialisma ribelo en Hungario 1956 kaj ĝia influo al bulgaraj studentoj.

La aŭtora stilo tamen restas ĉiam sama. Ĉiam plu senbezone detalaj priskriboj de okuloj, haroj kaj vestaĵoj, kun komparo de koloroj al io neordinara. Daŭras ankaŭ spuroj de plifruaj detektivajoj de la aŭtoro – en priskribo de policistoj ktp. Bone ke almenaŭ la bulgara ĉefurbo ree nomiĝas Sofio, sed ne iu stranga “Serda”.

Titolpaĝa averto: “*Ĉiu simileco al ekzistantaj personoj kaj situacioj estas ŝajna*” fakte permesas al la aŭtoro sur fono de pretere menciitaj historiaj eventoj senbride fantazii, prezentante sian subjektivan opinion kvazaŭ realon. Leganto pli-malpli juna, ne vivinta dum socialismo, bedaŭrinde povas eĉ kredi ĉion.

Iam oni asertis, ke en socialismaj landoj “estas diktaturo” kaj “mankas libero”, dum okcidente regas kompleta libero kaj feliĉo. Oni detruis la socialisman landaron kaj eĉ ĝojis pro tio. Tamen pasis 30 jaroj. Oni vidas, ke vivnivelo de ordinaraĵoj homoj draste falis kompare kun socialismo, aperis senlaboruloj, senhejmuloj, teroristoj... Nacioj, iam pace kunekzistantaj en unu ŝtato, nun furioze intermilitas, la vivo iĝis problemplena kaj malsekura. Krimoj multoblis – dank’al tio J.Modest havas materialojn por verki multajn krimromanojn... Do por pravigi iaman neniigon de socialismo, nun aperas verkoj pri antaŭa vivo, celantaj tordi kaj nigrigi la realon, laŭdi la politikan katastrofon de 1989-1991 – ke homoj junaj, mem ne spertintaj vivon en socialisma ŝtato, kredu, ke tiam ĉio malbonis kaj ne rimarku, ke nun ĉio malbonas multe pli ol tiam. Bedaŭrinde tiaj libroj aperas ankaŭ en Esperanto, kvankam la celo de nia lingvo estas porti veron kaj kontribui al interkompreno de popoloj.

Do ni rigardu la libron de J.Modest. Estas instrua ekzemplo, kiel oni povas pro simplanimeco unumomente perdi ĉion “sur malplena loko”. Bulgara junulo Matej, talenta en fiziko, studentigas en Sofio. Li havas bonajn perspektivojn en scienca kariero, bonan koramikion... sed lia “amiko” Zahari persvadas lin partopreni tumultadon por subteni la ribelon en Budapeŝto. “La hungaroj deziras egalecon de ĉiuj civitanoj, plurpartian sistemon, paroliberecon, forigon de la socialismo, ĉesigon de la komunistaj privilegioj”. En 1956 la ribelo fiaskis, sed nun ni vidas, al kio ĝi povus gvidi, kaj kio fine rezultis jardekojn poste. En ĉiu lando ekzistas pluraj partioj – diferencaj laŭnome, sed havantaj la saman unusolan realan celon: riĉigon de siaj gvidantoj. Ne plu ekzistas garantioj pri laboro kaj loĝejo, senpaga medicino kaj multaj aliaj aferoj – kiuj dum socialismo estis kutimaj kaj pro tio ne rimarkataj. Anstataŭe aperis “libero de opiniesprimo”: nun ĉiu rajtas publike diri, ke Tero estas plata, duoble du estas kvin ktp., kaj postuli saman estimon al sia opinio, kiel al la vero. Dum pasintaj jardekoj mi multfoje demandis plej diversajn homojn: kia konkrete libero mankis al vi en USSR? Neniu povis respondi senchave...

Studentoj devas studi – laŭdifine. Tamen en ĉiuj landoj, en ĉiuj epokoj multaj junuloj studentigas nur por prokrasti eklaboron, eviti militservon kaj senzorge ĝui la vivon: biero (aŭ pli drastaj substancoj), seksumado, brua

muzikaĉo... ankaŭ politikumado – kvankam kutime ili mem ne scias, kion ili celas, do lertaj “paŝtistoj” cinike fiuzas la senzorgulojn.

Laŭ instigo de Zahari Matej multobligas kaj disvastigas flugfoliojn, eĉ mem verkas “revolucion” poemon – bombastan kaj fuŝan. Kiam oni trovas la delikton de Matej, li panike fuĝas (Zahari, nature, tuj perfidas lin, ŝajngigante sin ne koncerna); atingas sian naskvilaĝon situantan ĉe jugoslavia limo kaj kaŝe transiras eksterlanden. Sekvas mizera vagado tra landoj, vegeto en la Centro por Enmigrintoj en Aŭstrio, fine tamen oni permesis lin iri en Germanion, kie (deus ex machina!) vivas lia onklo – kiu eĉ ne scias pri lia ekzisto, sed tuj ekkompatas lin kaj ĉiel helpas. Post nekredible miraklaj okazoj Matej studentigas en Munkeno, fama profesoro aprezas lian talenton (i.a. rimarkeblas, ke J.Modest apenaŭ havas imagon pri nuntempa scienco: optiko ne estas la branĉo, en kiu meze de 20-a jarcento okazis fundamentaj malkovroj), poste Matej eĉ edzinigas la filinon de la profesoro (ja, postmilite ne sufiĉas viroj...), kaj fine li ricevas proponon labori en sekreta scienca instituto “pri gravaj novaj teknologioj, ligitaj al arma industrio”, ŝanĝas la nomon al Frank kaj forgesas sian iaman bulgaran identecon. Evidente dum postaj jardekoj li verve laboras por bono de okcidentgermana armeo, direktita kontraŭ lia patrolando Bulgario.

Ĉiu honesta leganto, naskita antaŭ 1970, facile rimarkos multajn malveraĵojn en la rakonto. Ĉu civitanoj de socialismaj landoj ne rajtis veturi eksterlanden? Ĉu homoj el kapitalismaj landoj ne povis viziti la socialismajn? Mi bone memoras multajn eksterlandajn turistojn en Moskvo, eksterlandajn studentojn en niaj universitatoj. Ĉu Esperanto-movado en socialismaj Bulgario kaj Hungario estis subpremata kaj malmultaj restintaj esperantistoj kaŝis sin? Sed reale ĝuste tiuj du landoj estis la plej aktivaj. Ni, sovetiaj esperantistoj, volonte senprobleme aĉetis plurajn librojn de tie, ĉiuj konis la nomojn de verkistoj István Nemere kaj... Julian Modest! Sed post neniigo de socialismo E-movado en Bulgario kaj Hungario ne plu havas ŝtatan subtenon – do libroeldonado kolapsis, iamaj bonegaj revuoj malaperis...

Jen fabriko, iam privata, iĝas ŝtata proprietaĵo, kaj ĝia posedanto, ekspluatinta dekojn da laboristoj, iĝas ordinara laboristo tie – ĉu tio maljustas tiomgrade, ke homo povas morti pro ĉagreno? Ĉu ne estas pli juste kaj eĉ pli racie, se ĉiuj homoj havas indan vivnivelon, ol se unu familio vivas en superlukso kaj cent aliaj mizeras?


Julian Modest ĉiam orientiĝas al legantoj nespertaj, uzas simplan lingvaĵon. Tio ĝenerale bonas, sed ne ĉi-kaze. Ja naivaj kaj nespertaj legantoj, plejparte junaj, perceptos ĉion ĉi senkritike, kredos kaj kunsentos al protagonistoj. Se vi volas vere pripensi kaj esplori la fenomenon de studenta politikumado – mi anstataŭ “Sekreta taglibro” insiste rekomendas la romanon de Sten Johansson “Sesdek ok”, kiu traktas eventojn de 1968 en Francio tute realece (la aŭtoro skrupule precizas eĉ en etaj akcesoraj detaloj) kaj montras la malromantikan flankon de ĉio. Plurajn negativajn flankojn de studenta politikumado Sten Johansson traktis ankaŭ en plifrua romano “El ombro de l’ tempo”. Kiam oni penas solvi imagitajn problemojn – aperas problemoj realaj. Rompitaj sortoj, eĉ memmortigo pro kreskanta neadekvateco de la mondpercepto...

Delonge pasis la epoko, kiam ĉiu beletraĵo verkita en Esperanto estis konsiderata valora kaj portanta veron. Nun en Esperanto, samkiel en ĉiuj aliaj lingvoj, leganto devas esti pensema, sed ne naiva...

Valentin Melnikov

Por distro kaj amuzo

Krucenigmo



Horizontale:

1. Genro de grandaj, senvenenaj serpentoj (radiko).
4. Simpla, ordinare tola kapvesto de virino.
6. Optika vitro, kun aŭ sen muntaĵo, por unu sola okulo.
8. Tia, ke ĝia signifo estas duba, aŭ ke ĝi povas havi malsamajn sencojn.
10. Kirurgia instrumento, konsistanta el pineto kaj akra klingo.
12. Parta aŭ plena senmovebleco de artikolo.
13. Pli-malpli mola substanco, preparita el grasoj kaj alkalo (radiko).
15. Vokisto, kiu anoncas la preĝohorojn de supre de minareto.
16. Tuto de la disĉiploj de filozofo, verkistoj, artistoj, sciencistoj ktp, kiujn ili rigardas kiel siajn majstrojn (radiko).

Vertikale:

2. Protozoo, kiu moviĝas per pseŭdopiedoj kaj vivas en akvo, malseka tero aŭ parazitante en diversaj animaloj.
3. Plena konfuzo, malordego.
4. (figure) Ĉefrolulo, plej grava persono.
5. Embrio de mamulo, vidiganta trajtojn de la definitiva estaĵo (radiko).
7. Fotoaparato, kapabla sendi kaj/aŭ registri sinsekvajn bildojn, laŭ difinita ritmo.
9. Membro de tribo, klano k.s., kiu konstante migras de loko al alia.
11. Teoria simpligita figuraĵo, prezentanta maldetale la formon, sed la aranĝon kaj la rilaĵojn de ĝi.
14. Mikroskopa fungo aŭ oomikoto, havanta bone rimarkeblan micelion aŭ sporaron (radiko).

Kompilis Mikaelo Povorin

Certe, la edzino estas dia dono,
oni opinias ŝin mia duono.
Pri konkludo tia mi konsenti povus,
se la okulvitrojn mi ne tuj retrovus.
Karaj miaj "oni", tute vi ne pravas, -
pli ol kvar duonojn miajn ŝi enhavas!
Ĉu do mi fieru dum nia promeno
pro la okulfrapa ŝia volumeno?
Ho Sinjoro, pro la dono malavara,
mi vin dankas, tamen min kompatu, kara,
ja sufiĉas karno – faru du el unu,
kaj per la divido plian viron punu!



CERBE kaj KORE

n-ro 23 (91), decembro 2021

Kultura suplemento al la revuo "Ponto" n-ro 123

"Ponto" estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo "Rusia Esperantista Unio

*Oni rajtas uzi kaj represi ĉiujn materialojn de la eldono nur kondiĉe de ĝusta
indiko de la fonto*

CkK atendas viajn prozajn, poeziajn, interlingvistikajn, instru-metodikajn kaj scienc-
popularajn kontribuojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru .

Estraro de Rusia Esperantista Unio

Redaktofino 23.12.2021